

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk




Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro/Marto 1985



37a IFEF-kongreso en Vejle / Danlando 17a ĝis 23a de Majo 1985



Urbdomo de Vejle

foto: Karen Olsen

Printempa Danlando atendas la esperantistajn fervojistojn

Lastjare la membroj de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) travivis neforgeseblajn tagojn en Bulgario. En 1985, de la 17a ĝis la 23a de Majo, la dana urbo Vejle gastigos la 37an IFEF-kongreson ĉe la Balta Maro. Ĉiuj antaŭkondiĉoj por sukcesplena semajno ekzistas, des pli, ĉar la landaj asocioj en Danlando, Svedio, Norvegio kaj Finnlando transprenis la organizon de la kongreso.

Vejle sur la duoninsulo Jutlando situas apud fjordo ĉe la fervoja linio Hamburg – Fredericia – Aarhus, do ekde Hamburg facile por vi per trajno, atingebla en nur 4,5 hora veturo. Krom tiu favora cirkonstanco stimulas al partopreno sendube ankaŭ la allogo de la ĉarma, mezgranda urbo.

Ke tiu parto de Jutlando estas loĝigita jam kvin jarcentojn a.K., pruvas homa kadavro trovita en la marĉo kaj pro tio bone konservita; ĝin ankoraŭ nun oni povas rigardi en la preĝejo al la Sankta Nikolao, cetere la plej antikva konstruaĵo en la urbo. Vidindaj estas la majstre lignoskulptita altaro el la 18a jarcento, la renesancstila ambono kaj interesa kriptoj. La preĝejo servos al la kongresanoj por altkvalita koncerto. Kuraĝuloj estu atentigataj pri 23 kranioj, kiuj estas enmasonitaj en truojn de la ekstera muro. Laŭdire temas pri la kranioj de 23 rabistoj ekzekutitaj en la jaro 1630. Pli agrable estas aŭskulti la sonorilaron, kiu eksonas ĉiun tagon kvinfoje. Kiu promenas tra la krutaj stratoj, pro kio Vejle ricevis la nomon „la montarurbo de Danlando“, eksciu ankaŭ, ke la proksima urbo Jelling antaŭ mil jaroj estis rezidejo de la unuaj danaj reĝoj. Hodiaŭ Vejle, intertempe 800 jarojn aĝa, estas vigla industria kaj komerca urbo kun grava haveno apud la 25 km longa fjordo. Arbaroj kaj montetoj ĉirkaŭas la urbon, kaj ne mankas longaj strandoj ofertantaj liberaeran vivon, eble jam dum la kongresa semajno.

La kongresejo estas la Domo de la Sporto, ĉirkaŭ 15 minutojn for de la stacidomo. En la proksimeco troviĝas hoteloj pretaj por akcepti la kongresanojn laŭ iliaj deziroj. La prezoj estas proksimume egalaj

kiel en Germanio, do sufiĉe altaj, kaj inkludas la matenmanĝon. Detalojn vidu en la aliĝilo. En la kongresejo estas je dispono memserva prezfavora restoracio kaj banejo. La kongreso komenciĝos vendredon, la 17an de Majo, per interkona vespero kaj finiĝos ĵaŭdon, la 23an de Majo, post duontaga ekskurso. La provizora programo troviĝas sur la aliĝilo kaj enhavas la kutimajn aranĝojn, t.e. inaŭguro, laborkunsidoj, fakaj prelegoj, balo, distra vespero ktp.

Ne mankas ekskursoj. Duonan tagon aŭtobusa ekskurso kondukos tra la regiono de Vejle. Oni vizitos la amuzejon „Legoland“ kun siaj famaj konstruaĵoj el ludaj konstrubrikoj. Pri la alia duontaga ekskurso sekvas detaloj. Supozeble la kongresanoj veturos per trajno al Ribe, la plej malnova urbo de Danlando. Iom nekutime efektiviĝos la tuttaga ekskurso. Per aŭtobusoj la kongresanoj trapasos la sudjutlandan pejzaĝon kaj atingos la kastelon Glücksburg sur germana teritorio. Pluen al Gelting, kie la pramo akceptos ĉiujn por transporto al la insulo Fueno. Oni lunĉos dum la sufiĉe longa ŝipveturo. La laste vizitota urbo estas la idilia urbeto Svendburg. La aŭtobusoj traveturos eĉ montaron altan 138 metrojn, kiu fiere nomiĝas „Fuenaj Alpoj“. Entute alloga turisma programo. Sole tio meritas la partoprenon de eble plej multaj membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) kaj iliaj familianoj.

Do eluzu la okazon pasigi en la konata Esperanto-sfero varioricĉan semajnon dum la plej bela monato en la jaro. Jen la okazo praktiki kiel komencanto Esperanton, konatiĝi kun gekolegoj kaj amikoj kaj tiamaniere kontribui persone al la paco. Aliĝu baldaŭ! W.B.

Fervojista skisemajno

La 26-a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno okazos en Morzine (Francio) de la 16-a ĝis la 23-an de Marto 1985. Inf.: **s-ino C. Dugue, 8 bis av. Gén. Leclerc, F-91580 Etrechy, Francio.**

37. IFEF-Kongreß in Vejle/Dänemark (17. — 23. Mai 1985)

Der Internationale Verband der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) lädt seine Mitglieder und alle Freunde des Esperanto zu seinem 37. Kongreß nach Dänemark ein. Vejle in Nordjütland, eine reizvolle, an einem Fjord gelegene Hafenstadt mittlerer Größe, trifft alle Vorbereitungen, um den Teilnehmern aus voraussichtlich 20 Ländern eine ereignisreiche Kongreßwoche zu bieten. Die Organisation haben dankenswerterweise die 4 skandinavischen Landesverbände übernommen. Alle Unterkünfte liegen in der Nähe des Kongreßgebäudes, dem modernen Haus des Sportes, das außer den Tagungsräumen auch über eine preiswerte Cafeteria und ein Hallenbad verfügt.

Neben den fach- und organisationsbezogenen Arbeitssitzungen erwartet die Teilnehmer wiederum ein reichhaltiges Programm an kulturellen, gesellschaftlichen und touristischen Veranstaltungen, z. B. ein Konzertabend in der gotischen Stadt-

kirche, ein Ball sowie mehrere Bus- und Bahnausflüge. Die deutschen Teilnehmer sind insofern begünstigt, als sie von Hamburg bis zum Kongreßort Vejle nur etwa 4,5 Stunden mit der Bahn zu fahren haben.

Auskünfte und Anmeldevordrucke sind bei den Bezirksbeauftragten erhältlich. Der Kongreßbeitrag beträgt bis Ende Januar 1985: 300 Dänische Kronen (etwa 84 DM). Nutzen Sie diese Gelegenheit, um Esperanto als Eisenbahner zu praktizieren, um freundschaftliche Beziehungen zu schließen oder fortzuführen und um auch Ihren Beitrag zum Weltfrieden zu leisten. W.B.

Von den Eisenbahner-Funkamateuren ging uns folgender Bericht zu, den wir leicht verkürzt gern wiedergeben. Er zeigt, wie positiv auch von anderer Seite die Zusammenarbeit zwischen den kulturellen Freizeitgruppen des BSW beurteilt wird. daürig p. 4

Anzeige

EL POPOLA ĈINIO

Hinter diesem Namen verbirgt sich ein wahrhaft optimales Monatsmagazin in Esperanto. Es erscheinen 12 Nummern jährlich. Herausgeber ist der chines. E-Verband. Inhalt: Informationen über E-Bewegung, Kultur, Städte, Landschaften, Kochrezepte in China usw. Jedes Magazin hat ca. 60 Seiten mit vielen superscharfen Farbbildern.

Das Jahresabo kostet 18,— DM, für 2 Jahre nur 30,— DM und für 3 Jahre insgesamt nur 42,— DM (über 2.000 Seiten). Die Zeitschrift kommt nach der Bestellung erstmals in ca. 2—3 Monaten und dann pünktlich monatlich direkt aus Peking zu Ihnen nach Hause.

Bestellen Sie bei Peter Zilvar, Grubenhagenstraße 8, 3420 Herzberg am Harz. Überweisung des Betrages auf Kto. 441 176—304 bei Postgiroamt Hannover genügt.

Probeexemplar gegen Übersendung des Portos. Bestellen Sie auch eine Bücherliste aus China mit preiswerten Angeboten!

Für Besteller bis Ende Februar 1985 gibt es einen großen Farbkalender für 1985 und eine Landkarte von China in Esperanto aus Peking.

Aperis bela, plenkolora faldfolio sub la titolo **La Federacia Respubliko Germanio** eldonita de la Oficejo por Gazetaro kaj Informado de la Registaro. La informilo donas koncizajn informojn pri la ekonomio, socio, kulturo, turismo kaj estas senpage ricebla de „Deutsche Zentrale für Tourismus“, Beethovenstraße 69, 6000 Frankfurt/M.

Norvegujo — Reĝa Norvega Ministerio de Eksteraj Aferoj eldonis grandformatan broŝuron pri Norvegujo. La broŝuro enhavas 16 paĝojn da teksto kaj 8 paĝojn kun koloraj bildoj. Senpage havebla ĉe: Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schousv. 18, N-0572 OSLO 5, Norvegujo.

Elfriede Kruse partoprenis studvojaĝon tra Ĉinio

Ek de Londono flugis la 18an de Aprilo 84 internacia grupo de 21 esperantistoj el sep landoj al Ĉinio. Inter ili estis 2 germanoj, kiuj kun granda intereso kaj malfermitaj okuloj ĉion observis, kio estas rigardinda — kaj en tiel nekonata lando kiel Ĉinio ĉio estas rigardinda! Nia aviadilo sekvis la linion Romo — Barajno — Hongkongo — Pekino. Jam en la flughaveno de Pekino atendis nin delegacio de Ĉina Esperanto-Ligo, kaj oni prezentis al ni nian gvidanton por la tuta restado, sinjoron Gong. Li tre lerte kaj sperte faris dum la 21 tagoj por ni ĉion ajn. Sen iu ajn zorgo ni vizitis 8 diversajn lokojn: Pekino — Nanking — Suzhou — Ŝanhajo — Hangzhou — Nanĉang — Ĉangŝa — Vuhan. Ĉiam ĝustatempe estis je nia dispono la valizoj kaj la flug- aŭ trajnbiletoj. En ĉiuj lokoj atendis nin afablaj Esperantistoj, ĉu frumatene je la 5-a horo, ĉu je nokto-mezo. Kaj ili ege dorlotis nin.

Ne estas mia deziro, ĉi tie rakonti detale pri la vojaĝo kaj la travivaĵoj, kvankam ili estas multnombraj kaj ege interesaj. Mi pensas, ke vi spertu tion mem. Tamen mi povas konfesi, ke ni vidis multon: historiajn lokojn en Pekino kaj Nanking, ekzemple la Grandan Muron, la imperiestran palacon, la Ming-tombejojn, por nur mencii kelkajn: la pitoreskan urbon Suzhou (proksime de Ŝanhajo), kiu nomiĝas „la orienta Venecio“. En Ŝanhajo ni vizitis infanĝardenojn, lernejojn, fremdlingvan instituton de la universitato, ni ĉeestis kunvenon (eĉ plurajn!) kun pli ol 200 Esperantistoj, ni vizitis familiojn, inspektis operojn, infanteatron, akrobatan prezentadon, ni observis produktadon de porcelano, jado-skulptaĵojn, faradon de ventumiloj kaj silko-manufakturon de la komenco ĝis la finpretaj objektoj. Ni admiris la delikatajn fingrojn de junulinoj, kiuj lerte brodis aŭ pentris valorajn artobjektojn. Ni promenis en pitoreskaj parkoj, ekskursis per ŝipo sur la orienta lago, vizitis muzeojn kaj artgaleriojn, observis rikolton kaj teo-konservadon, konvinkiĝis pri faktoj en metiista kaj agrikultura kooperativoj, inspektis Bonsai-ekspozicion kaj botanikan ĝardenon. Gigantan viadukton kaj trafiko-gravan ponton ni surgrimpis. Neforgesebla estas la panoramo de la ponto sur la Gangtsi-

riveregon en Vuhan, sed la plej grava estis la kontakto kun ĉinaj geamikoj!

Se vi intencas vojaĝi al Ĉinio, jen kelkaj konsiloj:

Iom preparu vin antaŭe. Ne lasu ĉion nur al viaj organizantoj.

Vi venos en landon kun riĉa kulturo kaj alta tradicio, aliaj moroj, aliaj kriterioj, en landon kun alta disciplino. Respektu tion!

Vi spertos afablan popolon, vaste malfermitan por turistoj. Surprize vi konstatos amason de fervoraj Esperantistoj, ĉefe gejunuloj, simpatiaj, plenaj da scivolemo. Vi travivos kortuŝajn akceptojn kaj restadojn en amika etoso — ĉie ajn, kien vi venos! Ili atendos vin entuziasme. Ĝojigu la ĉinajn geamikojn per malgrandaj Esperantaĵoj, ekz-e kantfolioj kun muziknotoj. Kaj se vi volas intensigi vian viziton, kontaktu jam nun unu el la ie menciitaj korespondemuloj. Tiam atendos vin jam via persona amiko! — Bonan vojaĝon al kaj argrablan restadon en Ĉinio!

Elfriede Kruse

El „Speciala cirkulero“ (Paderborn) 47/84

BSW-Funkamateure zu Gast bei der 28. Jahresversammlung der Eisenbahner-Esperantisten

„Ĝenerala alvoko, ĝenerala alvoko en Esperanto-frekvenco, jen estas DF ϕ EK en Mönchengladbach“.

So klang es auf den international vereinbarten Amateurfunkfrequenzen der Esperantisten, als die kölnener Clubstation der Eisenbahn-Funkamateure im BSW, DF ϕ EK, als Tagungsstation bei der 28. Jahresversammlung der Eisenbahner-Esperantisten im BSW in Mönchengladbach vom 12. bis 14. 10. 84 ihren Sendebetrieb aufnahm.

Hervorragende Antennen und ein erfreulich guter Standort hoch über der Stadt Mönchengladbach, in Verbindung mit den leistungsstarken Geräten, ermöglichte den Operateuren der Station viele nette

Kontakte mit deutschen und europäischen Funkfreunden.

Natürlich hatten die Tagungsteilnehmer besonderes Interesse daran, bei Verbindungen in Esperanto zuzuhören. Dabei ergab sich oft die Möglichkeit, Grüße über den Äther auszutauschen.

Ein Interview über Esperanto zwischen den Operateuren der Station wurde aufgezeichnet und am Sonntag über den Rundspruch im Bezirk Nordrhein auf den UKW- und europaweit auf den Kurzwellenfrequenzen gesendet.

Einen beträchtlichen Teil ihres Artikels über die Veranstaltung widmete die „Rheinische Post“ unserer Station. In der Fernsehsendung „Aktuelle Stunde“ im WDR wurde Klaus Eigenbrod, Verbindungsmann zwischen den Eisenbahner-Funkamateuren und -Esperantisten, bei einem allgemeinen Anruf in Esperanto an der Station gezeigt.

Diese Art der Zusammenarbeit mehrerer BSW-Freizeitgruppen – in Mönchengladbach Esperanto, Amateurfunk und bildende Künste, die auch noch eine Gemäldeausstellung zeigte, – hat bei allen Beteiligten großen Anklang gefunden und sollte sich bei weiteren Gelegenheiten in dieser oder ähnlicher Art fortsetzen.

Dieter Poensgen

El la grupoj

Bremen:

La Zamenhoffeston festis la grupo la 12an de Decembro en la DB-kantino.

La 9an de Januaro surprizis sinjoro Kruse per kritika rigardo al nia lingvo sub la titolo „Kio ne plaĉas al mi en Esperanto“.

La diskutvesperoj, nun en la DB-kantino, okazis la 23an de Januaro kaj okazos la 27an de Februaro.

La jarkunveno okazos la 13an de Februaro 1985.

Essen:

Naskiĝis filino Verena de nia membro Bernhard Nienhaus kaj edzino Marianne. GEFA kore gratulas.

Nekrologoj

La 2an de Decembro 1984 mortis nia multjara membro

Josef Ballo (63)

Li estis aktiva membro de la grupo Duisburg kaj partoprenis kun sia edzino preskaŭ ĉiujn naciajn kaj internaciajn kongresojn. Kolego Rolf Terjung, Mülheim-Ruhr, partoprenis la entombiĝon kaj kondolencis ankaŭ nome de GEFA al la edzino.

-- † --

Otto Denk mortis

Nia ĉiam okupata, afabla, ridetanta Otto Denk ne plu estas inter ni. Naskita la 7an de Decembro 1900, la morto forprenis lin post longa malsano kvin tagojn post lia 84a naskiĝtago la 12an de Decembro 1984. Eĉ la malsanon kaj operaciojn li eltenis kuraĝe kaj ne grumblis pri la sorto.

Otto Denk lernis Esperanton post la milito kaj ekaktiviĝis en 1951 en Frankfurt//M okaze de la refondo de la tiea fervojista societo. Vaste konate li fariĝis de post 1957 kiel kasisto de GEFA, kiun oficon li prilaboris ĝis 1967 kiel estrarano de GEFA tre fidine kaj kun kasista firmeco. Tiam li ekŝiĝis el tiu laboro, estante jam en emerita stato. Tamen li ne ripozis, sed daŭre serĉis – kaj trovis terenojn, kie li povis doni siajn fortojn kaj spertojn por la bono de aliaj homoj. Ne nur ĉe la esperantistoj li faris tion. – ekzemple en Frankfurt ankoraŭ ĝis 1981 kiel grupo-kasisto, de entute 30 jarojn – sed en vico de aliaj societoj kaj kluboj.

La distrikt-komisiito de Frankfurt, Egon Kiefer, oficiale reprezentis GEFA en la entombiga ceremonio kaj metis florkronon sur la tombon. Ankaŭ ĉeestis la multjara kunestraranino kaj samklubanino Elfriede Kruse. Al la familio ni sincere kondolencas.

Otto Denk havis multajn amikojn kaj kreis multan bonon. Lia vivo ne estis vana. Li ripozu en paco!

Redaktifino por n-ro 2/85 estas la 25.3.1985

**Estraro kaj komisiitoj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio
en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojo**

Stato: Januaro 1985

Estraro

Prezidanto: BAR a. D. Giessner,
An der Nicolai-Schule 3, 3420 Herzberg
am Harz, tel. 0 55 21 / 45 86; EDS an
Bf 342 Herzberg (Harz)

Vicprezidanto/Redaktoro:

BAR a. D. Grass, Sachsenstraße 7,
8620 Lichtenfels, tel. 0 95 71 / 64 68
EDS: Gega 862 Lichtenfels,
Abhofach

Sekretario: BHS Riehn, Bm 680 Mannheim
Hbf, Basa 953/899/536 aŭ 1236

Distriktaj komisiitoj:

Essen: TBOS Retzlaff, Bf 474 Oelde,
BSW-Fach, tel. 0 25 22 / 36 52
aŭ Bm 480 Bielefeld, Basa 944/872/310

Frankfurt/Main: BAR Kiefer, BSA 600
Frankfurt/Main, AA 341, Basa 955/5656

Hamburg: BHS Böhnke, Bf 240 Lübeck Hbf.
Basa 947/866/374

Hannover: BBI a. D. Heimlich,
Bf 304 Soltau/H., tel. 0 51 91 / 52 13

Karlsruhe: BOS Bernhard, Bf 680 Mann-
heim Hbf, Basa 953/899/1232 aŭ 1238

Köln: BAmtm Herlitze, BD 500 Köln,
Büro B (Ozl); Basa 943/3473

München: BOS (St) Hrazdil
Bf 890 Augsburg Hbf
Privat: Herrenbachstr. 58, 8900 Augsburg

Nürnberg: TBOAR Röder, BD 850 Nürnberg
Th 20, Basa 966 / 5671

Saarbrücken: BBI a. D. Hauptenthal,
BD 660 Saarbrücken, V 26
Privat: Brennender-Berg-Str. 28
6603 Sulzbach/Saar, tel. 0 68 97 / 38 56

Stuttgart: TBOAR Krüger,
BD 700 Stuttgart, Bmkr. 3; Basa 952/3125

Specialaj komisiitoj

Emeritrenkontiĝoj

BHS-in a. D. Elfriede Kruse, Wiener Str. 121
6000 Frankfurt/Main 70, telef. 069/65 73 65

Arkivo: BHS Barmaneter, Bf 894 Memmin-
gen; Basa 962/809/357

Biblioteko kaj IFEF-kontaktadreso:

BAmtm Rösemann, BD 300 Hannover,
Bf 52, Basa 949/1470,
tel. 05725/7992

Gazet-kolektejo kaj -forluado: BAR Kiefer,
BSA 600 Frankfurt/Main, AA 341,
Basa 955/5656

Bulteno-dissendo: BOS a. D. Schindler
Max-Klein-Straße 21, 5830 Schwelm,
tel. 0 23 36/1 56 54, EDS: Fka 583 Schwelm

Fakterminaro: LBI Hartig, Bw 280 Bremen 1;
Basa 949/832/365

privata adreso: Kasseler Str. 76,
2800 Bremen 1, tel. 04 21 / 35 33 39

BOAR Ritterspach, ZVL 650 Mainz,
Mk 1315, Basa 954/5533;

Lingvaj ekzamenoj kaj instruado:

BAR Lautenbach Bktr 5, Bf 640 Fulda;
Basa: (nur lunde) 955/1693

Privata adreso: Abtstor 21, 6400 Fulda,
tel. (06 61) 7 76 27;

Kasisto: BOS Bernhard, Bf 680 Mannheim
Hbf, Basa 953/899/1232 aŭ 1238

Specialaj taskoj: TBAR a. D. Brandenburg,
Brinker Damm 24, 4404 Telgte,
tel. 0 25 04 / 83 60
EDS (ne urĝajn): DB-Schule, 440 Münster

BOAR Barnickel, ZVL 650 Mainz, Mk 1312
Basa 954/5537

Peto al la eksterlandaj geamikoj!

Jen ni komunikas la aktualan adresaron
de la GEFA-estraro kaj de la komisiitoj.
Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale
ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii
la akuratan akcepton.